# KTP!

LA REVUO DE LA
USONA ESPERANTISTA JUNULARO
VOL. 3. N-RO 13



# KTP!

624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
jtruong@loyola.edu
ISSN 1078-6554

Founded in 1993, it is the official newsletter of the US Young Esperantists. It is published 6 times a year and sent out to all members and supporters of USEJ.

Contributions may be sent to the address above. Opinions expressed in articles are those of the authors and not of USEJ or the Editor.

Fondita en 1993, ĝi estas la oficiala novaĵletero de la Usona Societo por Esperantista Junularo. Ĝi eldoniĝas 6 foje jare kaj estas dissendata al ĉiuj membroj kaj subtenantoj de USEJ.

Kontribuaĵoj estu sendataj al la adreso supre. Opinioj esprimitaj en artikoloj estas tiuj de la aŭtoro kaj nek de la Redaktoro, nek de USEJ.

*Redaktoro/Editor:* Jozef Truong
*Kompostisto/Layout:* Sybil Harlow

*Limdato por n-ro 15: la 21 de majo*
*Deadline for issue 15: May 21*

Articles may be submitted via email to
usej@webcom.com
(please use the ASCII-x format)

Artikoloj povas esti senditaj per reto al
usej@webcom.com
(bonvolu uzi la ASCII-x-formaton )

## *Karaj Amikoj,*

Mi povas raporti senhonte, ke 1995 estis nia jaro! Memorante ĉion kion ni atingis ĉi-jare, mi estas ege feliĉe kaj esperplena por la venonta jaro. La kongreso en la Granda Pomo, diskutado kun ELNA pri niaj rilatoj dum la venontaj jaroj, JES '95, kaj elektado de USEJano al la Estraro de TEJO ĉiuj okazis ĉi-jare. Ĉu mankis sukcesoj?

Jam por 1996 ni havos kelkajn dolĉajn momentojn. Ekzemple, vi legos en ĉi tiu numero pri planata numero inter ni kaj eŭropaj amikoj. Kvankam en Eŭropo tiuj eldonaĵoj estas sufiĉe kutimaj (fakte, tuta gazeto, Koncize, temas pri eŭropa kunlaborado), ĝi estas nia unua klopodo. Ni esperu, ke ĝi sukcesu! La sukceso ja dependos je vi.

Cetere, ni tre entuziasme planas nun tri printempajn kongresojn en Nevado, Pensilvanio kaj Florido; kompreneble vi povos atendi amuzajn rakontojn pri tiuj grandaj eventoj en estonta numero. Tamen, kial atendi? Anstataŭ legi pri ili, ĉeestu ilin! Sendube, tiu konsilo validas ankaŭ por la Nacia Kongreso en Detroit, kiun Sherry Wells senĉese (sed certe ne senlace!) organizas jam kvar jarojn (!), la Internacia Junulara Kongreso en Guntersberge, kaj la Universala Kongreso, kiu finfine okazos en mirinda Prago. Espereble mi havos la feliĉan okazon renkonti vin ĉe tiuj eventoj!

Tamen, antaŭ ol ni povos festi tiujn okazojn, ni devas bonvenigi la novan jaron. Do, sezonajn salutojn al vi ĉiuj, kun esperoj por plena jaro de feliĉo, amuzo, ĝojo kaj ĉio alia bona en la nova jaro 1996!

*Amike salutas,*
*Joĉjo Truong*

**Usona Esperanista Junularo**

USEJ is a non-profit, national organization for US Esperantists 27 years old and under.

Donations, subscriptions, etc., can be made payable to "Usona Esperantista Junularo" and sent to the treasurer or the ELNA CO.

USEJ estas senprofita organizo por junaj (malpli ol 27 jaraj) Esperantistoj en Usono.

Donacoj, abonoj ktp. pageblas al "Usona Esperantista Junularo" kaj sendeblas al la kasisto aŭ la ELNA Centra Oficejo.

Membership/Membreco: $15/year
Subscription to KTP!/ abono al KTP!: $15/year

Treasurer/kasisto
Nathan Treadway
3769 South A Street
Richmond, IN 47374

ELNA Central Office
PO Box 1129
El Cerrito, CA 94530
(510) 653-0998
elna@netcom.com

© 1995 Usona Esperantista Junularo

 ★ On Nov. 18 the UEA celebrated 40 years of the Central Office in Rotterdam. ★

# Skolta Esperanto-Ligo Ekviglîĝas Denove en Usono

Allan Fineberg, Nacia Reprezentanto de SEL

La skolta movado naskiĝis en Anglujo ĉe la fino de la lasta jarcento. Ĝi estas la plej disvastiĝinta junulara movado, kun membroj en multaj landoj organizitaj en siaj respektivaj land-asocioj. La internacia movado nomiĝas World Scout Bureau, kun oficejo en Svislando. Kiel en la Esperanta movado, la monda ĉef-sidejo havas la respondecon kunordigi internaciajn eventojn ktp, sed landaj asocioj restas tute sendependaj kaj memstaraj. Tial, ekzistas multe da varieco en la tutmonda movado.

En iuj landoj, ekzemple, ekzistas nur unu landa asocio, por inaj kaj malinaj skoltoj. Tiu estas la situacio en multaj eŭropaj landoj. En Usono, kontraŭe, ni restas kiel ĉiam depost la fondiĝo de la movado kun du apartaj asocioj: Girl Scouts of the United States of America, kaj Boy Scouts of America. En aliaj landoj, kiel Germanio kaj Israelo, la skolt-asocioj estas organizitaj lau religiaj kaj etnaj grupoj, respektive.

La movado ĝenerale emfazas bonan konduton, sobran viv-stilon, kredon je Dio, bonan flegadon de la tero kaj fizikan bonfarton. Ĝuste ĉi tie, en la bazaj kredoj de skoltismo, venas problemoj nuntempe en la BSA, eble unu el la pli neŝanĝiĝemaj skoltaj grupoj. Niaj du apartaj skolt-asocioj en Usono estas ĉiam pli kaj pli nesimilaj. GSUSA estas maldekstre de la BSA, kaj nur por inoj. Laŭ mia scio, ekzemple, ĝi ne havas oficialan starpunkton pri samseksamaj estroj en la movado. Kontraŭe, BSA estas plejparte nur por malinoj, kaj ĝia sinteno pri samseksamo estas ke tiu ne estas morale akceptebla konduto. Pederastio estas ĉiama problemo en BSA, kaj la sekreto ne estis tre bone kaŝita ke estis/as problemo ĉe iuj trupestroj ktp. Spite al tio, ke aliaj organizoj, eĉ eklezioj, jam akceptis samseksamon kiel normala, tute ne eksterordinara parto de la vivo, BSA rifuzas toleri ĝin ene de sia membraro.

Alia granda temo de debato en la BSA estas la demando pri ateismo. Oficiale, la sinteno de la organizo estas, ke ĉiu membro devas havi kredon je ia speco de dio. Ne gravas multe kia speco, nur gravas ke oni devas konfesi kredon je iu dio. Tiu estas neforlasebla trajto de skoltismo. Tamen nuntempe, iuj unuopuloj kaj grupoj deziras forigi tiun kiel kondiĉo de membreco. Eĉ kelkaj junuloj kaj plenkreskuloj en la movado kiuj atingis la plej altan rangon, "Eagle Scout" (aglo-skolto), nun diras ke ili estas ateistoj, kaj demandas kial ili devas kredi en dio por partopreni en skoltismo.

Tria temo kiu estas ofte debatata en rec.scouting en Usenet estas kial ekzistas ankoraŭ du apartaj skolt-asocioj en nia lando, kiam en multaj aliaj landoj oni havis tre bonajn spertojn kunigante inajn kaj malinajn organizojn? Bona demando, mi opinias.

Por mi kiel Nacia Reprezentanto de SEL, mi estas feliĉa, ke nia skolta/esperanta movado ne devas havi oficialan - aŭ eĉ neoficialan - starpunkton pri ĉiuj ĉi tre disputeblaj topikoj. Por ni en SEL gravas, ke ni havas ĉi tiun ilon, Esperanton, por servi al ni kiel ponto-lingvo inter ni kaj niaj frato-skoltoj en aliaj landoj. Tie ĝuste estas nia forto kaj nia allogo. Se skoltismo vere temas pri harmonio inter homoj de diversaj landoj, kulturoj, sociniveloj, religioj, etnaj grupoj, lingvaj komunumoj....nu, estas facile vidi kiel Esperanto estas taŭga ilo por la antaŭenigo de tia kredo.

Se vi deziras alliĝi al SEL, nia kotizo estas:

ĝis la aĝo de 18, $5.00
18 kaj pli aĝa, $15.00


Membroj ricevos La Skolta Mondo, kiu estas nia kvaronjara revuo. Espereble post ioma tempo nia usona filio pli kaj pli aktiviĝos. Ni bezonas helpon por atingi iom da atento je la flanko de la du oficialaj usonaj skolt-asocioj. Kotizoj estas pageblaj al la kasisto de USEJ, kiu transdonos la monon al SEL, minus 20% administraj kostoj, kiu iros al SEL-Usono por niaj elspezoj.

Kaj se vi deziras kontakti min, la plej rapida rimedo estas e-poŝte: fineber@pilot.njin.net

Pli da informoj pri SEL estas haveblaj en la TTT ĉe:
http://www.webcom.com/usej/selfaq.html

**KTP!** ★ **La 18an de novembro, UEA festis 40 jarojn de la Centra Oficejo en Rotterdam.** ★

# ESPERANTO ROCKS OUT!



***Ĉi tiun someron mi havis la eblecon paroli kun Reĝo, la kantisto de AKVO. Ni parolis dum pli ol unu horo (ofte interrompate, ĉar ni estis ĉe la ELNA-kongreso en Novjorko) Li ankaŭ faris koncerton ĉe la ELNA-kongreso por la feliĉigo de la junularo. Kiam ni unue konversis mi demandis al li iom similajn demandojn ol al la novaj estraranoj de USEJ.***

| | |
|---|---|
| Kio estas via plej ŝatata glaciaĵo? | Fragoj |
| Bildstrio? | Care Bears |
| Gazeto? | Rok-gazet' |
| Ferivojaĝa loko? | Ĉie en la mondo estas natura. |

**◆ Oni povis antaŭe legi iomete pri la historio de AKVO en malnova Rok-gazet, sed kio estas via nuna stato?**

Ekde kelkaj monatoj, mi estas profesia muzikisto kaj laboras por AKVO kaj unu alia grupo. Mi ludas la klaviaron kaj kantas. La du fratoj, Roger CHAUMA kaj Robert CHAUMA ludas la gitaron kaj la respektive basgitaron. Nia antaŭa kantisto estis Patris LORD, sed li ne plu estas kun la grupo. Antaŭ la koncerto ĉi tie nia plej lasta koncerto estis ĉe St.-Catherine de Atle en Kebekio por la Esperanto-Societo de Kebekio.

**◆ Kaj nun kion vi faros?**

Mi komencis muzike pere de Esperanto ĉar mi opiniis ke ĝi plibonigas kaj grandigas la Esperanto-movadon. Por la Kebekia movado. Mi estis inspirita de Patris GERME, sed li ne plu estas kun la grupo. Nun ni jam verkis sep kantojn kaj laboras pri la aranĝoj de du kantoj. Ni opinias ke bendo venos kiam ni havos pli da mono. Sed mi volas iri al Eŭropo en alia jaro kaj ludi kun alia persono (de Amplifiki) iom da muziko. Eble krei ion novan kun li.

**◆ Kiu aspekto de la Koncerto mem vi ŝatas, ĉu la spektaklo?**

Jes, certe. Se ne estas reago, mi provokas ĝin. Kiam estas la spektaklo, mi sentas la animecon de la homamaso. Mi ŝatas ke ili ludas kaj dancas, kaj provas pli instigi ilin fari tion. Mi ankaŭ ŝatas danci sed ĉar mi klavas, mi ne povas movi min tro, do mi plaŭdas miajn manojn kaj parolas kun la homamaso.

**◆ Ĉu vi uzas "La Bamba"?**

"La Bamba" estas himno de Esperantistaj gejunuloj de la tuta mondo. Kiam mi ludis ĉe la IJK antaŭe, "La Bamba" estis regula, ili ĉiam dancis "La Bamba" ĉiun duan horon. Mi opinias ke estas devo ludi ĝin ĉe ĉiu Esperanto-evento.

**◆ Kiun muzikon vi ŝatas kaj aŭskultas kiam vi estas en aŭtomobilo?**

Mi ŝatas Amplifiki kaj Team en la Esperanto-movado. De angla muziko, mi aŭskultas "Super-Tramp" de Journey; "Sweet Madam Blue"; Pink Floyd, la plejn lastan; Use Your Illusion I & II de Gun's 'N' Roses, speciale "November Rain"; "Unplugged" de Eric Clapton; kaj ENYA, mi havas du de ŝiaj bendoj. Mi ankaŭ ofte aŭskultas nian muzikon ĉar mi povas plibonigi la kantojn. Fakte, mi verkas multe en la aŭto mem kaj ekzercas mian voĉon per la Tibeta praktiko (mi zumas de alta al malalta).

**◆ Kiam vi verkas kantoj kion vi pri pensas? Ekzemple, kiam vi verkis vian kanton, Daŭriĝu Naĝi?**

Estis pri trafiko, mi ne ŝatas ...oni devas provi! Eble estis iomete pro tio ke mia patro mortis, kaj mi sentas ke tio okazis tro frue. Mi pensas ke vi ĉiam devas klopodi, naĝi, aŭ vi dronas sen kompletigi vian vivon. Sed mian vivon mi plejparte vivas per la kanto, "ĉiutage", ĉar mi estas iu, kiu decidis plenumi miajn revojn. Oni devas faru kion tion oni volas hodiaŭ. Vi elektis vian feliĉon. Mi trovis "energio venos de amo" (dirite al mi de Mikaela Namovoc, nee-Esperantisto). Oni devas havi saĝecon uzi amon. Amo sen sagecon estas bombo, kaj se vi bone komprenas tion, vi povas bone vivi feliĉe.

Akvo has again been invited to appear at this year's ELNA congress.



If you are interested in learning more about the Esperanto music scene, check out the magazine Rok-gazet'. Produced by EUROKKA, it contains interviews, music reviews and the latest news. $20 for a four issue subscription available through the ELNA subscription service.
There is a music web page at:
http://www.webcom.com/usej/muziko.html

## Daŭrigi Naĝi

Survoje mi revas revas pri lago
Ĝis domo tro labori tro da bruo tro da mono
tro da mi endormiĝas iomete paŭzi
trankvile sonĝi sonĝi ronkante

Vi ĉion povas eĉ trairi ĝin
se vi volas se vi volas daŭrigi naĝi

Surlage mi naĝas naĝas senĉese
Ĝis bordo tro for de mi tro da akvo tro da akvo tro da ondo
tro da mi ne plu povas iomete paŭzi
Ĉu vere alveni sukcesi trairi ĝin

Vi ĉion povas eĉ trairi ĝin
se vi volas se vi volas daŭrigi naĝi

Sublage mi dronas batalas senĉese
Ĝis fundo tro da suldo tro soleca sen helpo
tro da mi ne plu povas iomete esperi
Ĉu vere mortiĝi sukcesi trairi ĝin

Vi ĉion povas eĉ trairi ĝin
se vi volas se vi volas daŭre naĝi

## Ĉiutage

Eble en tiu mondo homoj muzikus anstataŭ militi
vere paciĝi enamiĝi kun natu--ro

Brakumu virinon donu manon
ridetu al amikoj fidu al vi-mem
ĝoju pri la viv' ĉiutage ĉiutage

Volonte lernu vivi sinkonu anstataŭ kritiki
Okaze meditu pripensu kaj kore reagu

Finfine frakasu ĉenon vivu plene anstataŭ mizeri
Kuraĝe donu por doni amu por ami kaj forgesu vin-mem

Song Lyrics @AKVO.Not to be reprinted without express permission from the author, Reĝo Patris.



# Music for the Modern Day

Akvo isn't the only rock band on the Esperanto horizon. In the past ten years the music scene has developed greatly and nowhere is this more easily visible than in the compilation album, Vinilkosmo-Kompil'. Vinilkosmo is the record label founded by EUROKKA, for promoting Esperanto pop, rock, jazz, and folk music. This first volume has singles from 15 different bands.

An obvious labor of love, Kompil' is a great introduction to the new music available. The music covers the spectrum from rock to alternative to folk, and is good enough that my non-Esperantist fiance, enjoys it as well. The liner notes include a page about each band, including the lyrics to the song; a short intro to the band and what they were trying to convey in the song, in Esperanto, English, French, Spanish and German; a discography of the bands previous works; and a contact address.

The only real problem with the album is the high price (about $25), but that's not extraordinary for an import. Work has already begun on the next album and preorders are being accepted by Vinilkosmo at Vinilkosmo, Esperanto-Rok-Asocio, F-31450 Donneville,Francio (telefono: +33 61819565).

**SPECIAL CONTEST!**

Send in a postcard by July 1,1996, with your name and address andyour favorite *KTP!* feature. The randomly drawn winner will receive a special demo audio tape from Kompil' 1

## Lingva Angulo

**These terms are from the Rokmuzika terminaro available at: http://www.e.kth.se/espo/pmeg1/roko/rokopopo.html by Bertilo Wennergren**

**bendomimado**-*mime, lip sync*- Ŝajnigado de kantado kaj/aŭ ludado, dum la vera sono venas de sonbendo aŭ simile. Vd. bendakompanado.

**damna metalroko**-*doom metal*- Speco de metalroko, en kies tekstoj abundas temoj kiel nigra magio kaj la diablo.

**va-va-ilo**-*wah-wah-pedal*- Efektilo, kiu kvazaŭ imitas la krion de bebo per drastaj ŝanĝoj de la tembro, ofte uzata kun elektraj gitaroj.

**turneisto**-*roadie*- Helpanto, kiu kuniras kun bando dum turneo por helpi pri portado, muntado kaj aliaj laboroj. Ofte ĉiu bandano havas sian personan turneiston, kiu speciale kompetentas pri liaj instrumentoj kaj bezonoj (gitarturneisto, drumturneisto k.t.p.).

**sintezilo**-*synthesizer*- Muzika instrumento, kiu kreas sonon elektronike per sintezado. Ordinare ludata per klavaro, sed la regilaro por elekti la tonojn ankaŭ povas havi alian formon.

**repo, repkantado**-*rap, rapping, rap music*- Speco de funko karakterizita de rapida ritma parolado.

**ritmenbluso**-*rhythm and blues*- Speco de muziko kreita el bluso per aldono de forta danca ritmo en la 40-aj jaroj en Usono.

# Kursoj en Hartfordo Dependas de Vi!

Few realize that the Universty of Hartford in Connecticut has been offering high-quality Esperanto courses over the past few years. Now more than ever you should consider taking one of the courses, not only to help you, but to save the course, as well....

Pasigi tempon en Esperantujo ne estas ofta okazo, precipe por usonanoj. Krom multekosta vojaĝo, ni ne povas ĝui veran esperantistan etoson.

Tamen, por la enloĝantoj de orienta Usono, ekzistas la someraj kursoj ĉe la Universitato de Hartford. Jam de ses jaroj ĉi tiuj kursoj sukcesis. Dum tuta semajno, lernantoj je diversaj niveloj kunsidas, konversacias, kaj vere progresas. Krom la lecionoj, estas ankaŭ vesperaj kunvenoj, kiuj prezentas ludojn, kantojn kaj diskutojn- ĉio en Esperanto. La ĉi-jaraj kursoj ĉe Hartford ja denove sukcesis, kuniginte 23 partoprenantojn ekde komencantoj ĝis spertuloj. Loĝante plejparte en la sama kontraŭajo dum la semajno, ĉiu studanto trovis multajn okazojn amuziĝi per kaj en Esperanto. Por esperantistoj, ĉi tiuj kursoj reprezentas vere gravan pruvon, ke estas intereso inter usonanoj pri Esperanto, kaj provizas okazon por allogi interesantojn.

Nun, la estonteco de la someraj kursoj estas sub minaco, ĉar estas malfacile kolekti la minuman necesan kvanton da kursanoj: 30 personojn. Se ni ne povos montri al la universitataj instancoj, ke ja ekzistas sufiĉa subteno por la kursoj, ili ne okazos venontjulie! Kaj, se Esperantujo perdos ĉi tiun valoran studsemajnon, ĝi, eble, perdos ĝin por ĉiam. Nur per komuna deziro kaj agado ni povas savi la programon. Jam nun necesas certigi la minuman kvanton al la universitato.

Konsideru, ke la kursoj estas universalaj, do utilaj por ĉiu. La unua nivelo estas por personoj kun nula aŭ preskaŭ nula scio de Esperanto; la dua- por tiuj kun scio de la bazaj gramtiko kaj vortaro; kaj la tria- por tiuj, kiuj parolas Esperanton sufiĉe bone kaj eĉ tre bone. Krome, estas eksterklasaj aranĝoj, dum kiuj la partoprenantoj povas uzi la lingvon en ĉiutagaj situacioj. Ĉiu ricevos grandan utilon kaj diplomon!

Bv. skribi mem, kaj skribigi aliajn personojn (ne nepre el Usono!) al:

Dr. Humphrey Tonkin
Office of the President
University of Hartford
200 Bloomfield Avenue
W. Hartford CT 06117

Tiam bonvolu anonci vian deziron partopreni la venontjarajn kursojn, kaj peti, ke oni metu vian nomon sur liston. Tiel, vi informiĝos pri la aranĝoj dum la jaro. Antaŭdankon pro via komprenemo kaj kunlaboro! Ni ne lasu perdiĝi ĉi tiun bonegan programon!

Arnold Langberg

## Lingva Angulo

En Transilvanio, fama precipe pro la iama pinco de Valaĥio, Vlad Dracul (Dracula, kompreneble!), oni parolas latindan lingvon, kies nomo rememorigas pri la iama imperio romana- la rumana. Dankojn al nia multe laboranta Ionel Onet de la CO de ELNA!

Bonan matenon!
**Bunax dimineat,a!**

Bonan tagon!
**Bunax ziua!**

Bonan vesperon!
**Bunax seara!**

Bonan nokton!
**Noapte bunax!**

Saluton!
**Salut!**

Ĝis revido!
**La revedere!**

Adiaŭ!
**Adio!**

Kiel vi fartas?
**Ce faci/faceti?**

Dankon, bone.
**Mult,umesc, bine.**

Kaj vi?
**Dar tu/voi?**

Kiel vi nomiĝas?
**Cum te cheamax?**

Mia nomo estas...
**Numele meu este...**

Ĉu vi parolas E-on?
**Vorbes,ti/vorbit,i esperanto?**

Malfeliĉe ne.
**Din paxcate nu.**

Esperanto estas utila lingvo.
**Esperanto este o limbax utilax.**

Ĉiu lingvo estas utila.
**Fiecare limbax este utilax.**

# The British are Coming!!

***Dank' al Theresa Makin, via estrarano pri internaciaj rilatoj, la Junularo Esperantista Brita kaj USEJ eldonos komunan numeron de niaj novaĵleteroj por niaj membroj! Jen bonega forumo por konigi viajn ideojn, pensojn, verkojn kaj aliajn al britaj kaj usonaj junuloj kaj sekve fariĝi konata de ambaŭ flankoj de l'Atlantiko!***

Thanks to Theresa Makin, your board member on international relations, the national Esperantist youth boards of the United Kingdom (JEB) and United States (USEJ) have decided to create a communal issue for our members, to be published in the March/April 1996 issue.

Recently, JEB collaborated on a communal issue with Junulara Esperantista Franca Organizo. In fact, these types of projects have been popular in Europe for some time. This will be the first time, however, that British and American youths have published together.


While the exact details are being worked out, why not take some time to think about how YOU can contribute to this exciting project? Here's a perfect opportunity to let young people on both sides of the Alantic know how youw feel!

Whatcha you feel like saying? How about writing a short article about how young Esperantists can improve their knowledge of the language? Maybe you have a great idea on how to attract more young people to Esperanto. Know a way to get money for travelling? Feel free to pass it on! As always, we're also looking forward to receiving stories, poems, literary works, games, puzzles etc.

Send your contributions to: Ktp!, 624 Second Street , Lancaster PA 17603-5114
or e-mail at (jtruong@loyola.edu).



KTP!
624 Second St.
Lancaster, PA 17603-5114
ISSN # 1078-6554



Come and join us at the ELNA congress this year
July 13-15, 1996 in Detroit, Michigan.
Look for your sign-up sheet in the coming months.

## What's Inside:

- The US Esperanto Scouting League
- An Interview with AKVO
- A red alert on the Hartford Esperanto Courses
- Excerpts from the Rokmuzika Terminaro
- BENNEM
- Review of the Esperanto Rock compilation album
- And much more . . .